

Matthias Claudius,  
Abendlied

1. Der Mond ist aufgegangen,  
Die goldnen Sternlein prangen  
Am Himmel hell und klar;  
Der Wald steht schwarz und schweiget,  
Und aus den Wiesen steiget  
Der weisse Nebel wunderbar.

Wie ist die Welt so stille  
Und in der Dämmrung Hülle  
So traulich und so hold!  
Als eine stille Kammer,  
Wo ihr des Tages Jammer  
Verschlafen und vergessen sollt.

2. Seht ihr den Mond dort stehen? -  
Er ist nur halb zu sehen  
Und ist doch rund und schön!  
So sind wohl manche Sachen,  
Die wir getrost belachen,  
Weil unsre Augen sie nicht sehn.

3. Wir stolze Menschenkinder  
Sind eitel arme Sünder  
Und wissen gar nicht viel;  
Wir spinnen Luftgespinste  
Und suchen viele Künste  
Und kommen weiter von dem Ziel.

4. Gott, laß uns dein Heil schauen,  
Auf nichts Vergänglichs trauen,  
Nicht Eitelkeit uns freun!  
Laß uns einfältig werden  
Und vor dir hier auf Erden  
Wie Kinder fromm und fröhlich sein!

5. Wollst endlich sonder Grämen  
Aus dieser Welt uns nehmen  
Durch einen sanften Tod!  
Und, wenn du uns genommen,  
Laß uns in Himmel kommen,  
Du unser Herr und unser Gott!

...

Matthias Claudius,  
Vespera kanto  
*tradukita de Adolf Burkhardt*

1. Leviĝas luno; hele  
orpompas surĉiele  
la steloj al l'okul'.  
Arbaro mute revas;  
el la herbej' sin levas  
mirinde blanka la nebul'

2. Ripozas mont' kaj valo  
sub la krepusk-vualo  
trankvile kvazaŭ lag'.  
Por vi jen la permeso  
fordormi en forgeso  
la malbonaĵojn de la tag'.

3. La luno nur duone  
Prezentas sin impone;  
gi tamen estas sfer':  
Facile ni priridas  
aferon, se ni vidas  
nur parton de la plena ver'.

4. Homidoj ni fieraj  
pekuloj nur, mizeraj;  
ne multon scias ni.  
Ni teksas iluziojn  
kaj serĉas multajn sciojn  
kaj devojiĝas pli kaj pli.

5. Ho Di', nin lasu vidi  
la Savon, ne plu fidi  
vantajojn de l' pasem'!  
Nin faru simpl-animaj,  
infane Dio-timaj  
en ĝoj', jam nun sen zorga trem'!

6. Vi fine, sen ĉagreni,  
el mond' nin volu preni  
per milda morto for.  
Nin tiam al ĉielo  
venigu, al la celo:  
Vi, nia Dio kaj Sinjor'!

...

6. So legt euch denn, ihr Brüder,  
In Gottes Namen nieder;  
Kalt ist der Abendhauch.  
Verschon uns, Gott! mit Strafen,  
Und laß uns ruhig schlafen!  
Und unsern kranken Nachbar auch!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 – †1815-01-21).*

*Arg-394-776 (2012-12-24 20:31:03)*

*La poemo estas kantebla laŭ melodio verkita de Johann Abraham Peter Schulz (31.03.1747 - 10.06.1800). Pri tiu vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Johann\\_Abraham\\_Peter\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Johann_Abraham_Peter_Schulz). Vidu ankaŭ: <http://ingeb.org/Lieder/DerMondi.html>. Tie estas audebla la meolodio. La muziknotoj troviĝas en <http://www.liederprojekt.org/lied27783.html>.*

7. Gefratoj, nun ekkuŝu!  
Vin nokta vent' ne tuŝu,  
dum ŝirmas angelar'.  
Indulgu, Di', nin grace,  
por ke nun dormu pace  
ni kaj malsana la najbar'.

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de ADOLF BURKHARDT (pastro, \*1929-04-10 – †2004-04-02).*

*Arg-394-780 (2007-03-27 19:07:21)*

*Tiu ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, prenis el la kant-libreto “Mia kantaro I”, dua eldono de Majo 1998, kompilita kaj eldonita de s-ro Josef Schiffer, Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio. Sinjoro Josef Schiffer donis al mi la permeson.*